

La Verda Stelo



**SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO**

septembro 2012



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

prezidanto

s-ro J.B. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. +3150 527 45 72
retadreso:
johan.swenker@xs4all.nl

sekretario

s-ino N.R. Kiel-Klunder
G. Sterringastraat 60
9728 VV Groningen
tel. +31505251436
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com

kasisto

s-ro L. Staghouver
Julianalaan 25
9781 ED Bedum
tel. +3150 301 40 15
retadreso: luitstaghouver@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman
Westerein 14 a
8571 GB Harich (Frl)
tel. +3151 460 22 72
retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas
de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

J.B. Swenker, N.R. Kiel-Klunder
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com



Enhavo

- 3 ... Kunvenoj
- 4 ... Naskiĝtagoj
- 5 ... Pri la nordo
- 7 ... KELI-kongreso
- 9 ... Forpaso
- 10 ... Bad Zwischenahn

fotoj de *Johan Swenker kaj Franz Kruse*

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2012

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
Gezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00
Over te maken op ING banknr. 3822472 t.n.v. ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Bedum	

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van
ESPERANTO NEDERLAND.

Vandaar dat wij hier ook het rekeningnummer ervan vermelden:

78 68 44 167 (TRIODOS-Bank), t.n.v. Esperanto Nederland, Monnikendam

Lidmaatschap (incl. abonnement Fen-X)	€ 30,00
Gezinslid	€ 10,00

Klubkunvenoj

septembro 2012

20 voĉlegi viajn kunportitajn tekstojn

oktobro 2012

4 malferma vespero

18 Johan rakontos pri la ĝardenoj de *Appeltern*

novembro 2012

1 traduki Esperanto-tekston

15 Nelly rakontos

29 vintraj tradicioj en la mondo

decembro 2012

13 festvespero, ekde la 19.00 h

januaro 2013

3 vivanta gazeto

17 alternsemajna ripetaĵo

31 krucvortenigmoj

februaro 2013

14 gramatiko

28 jarkunveno

marto 2013

14 nekonata

aprilo 2013

11 Ineke prelegos pri Armenio

25 nekonata

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj
ŝanĝojn vi trovos en nia
retejo sub la rubriko

Aktuale

<http://pingveno.nl/klubo>



Naskiĝtagoj

septembro

- 5 Berendina Brink
- 7 Marita Kruijswijk
- 17 Henny van Hogen-Cornelissen
- 24 Els van der Heij-Alblas

oktobro

- 2 Fien Koopmans-Hollenga
- 15 s-ino Behr-Kunst
- 29 Bets Dodebier

decembro

- 1 Richard Hofman
- 30 Rients Hettinga
- 31 Bram van der Heij



12 aprilo 2012

Ĉeftemo: Ludoj.

Wil kontaktis kun Boudewijn (iama kursano). Li studas Esperanton denove kaj intertempe membriĝis al Esperanto Nederland. Li demandis Wil ĉu *media premio* estas bona traduko de *mediaprijs*. Ni opinias, ke tiu traduko ne estas ĝusta. La Esperanto-vorto *medio* signifas *milieu*. La ĝusta traduko de *mediaprijs* estas *komunikilpremio* (aŭ *komunikila premio*).

Luit havas novan korespondamikon. Ĉi-foje ne estas iu en fora lando, sed nederlandano.

Wil kunportis plurajn ludojn. Ni amuziĝis i.a. per *domilingo*. Tre amuza kaj lerniga estas ludo kun literoj. Sur la tablo kuŝis centoj da malgrandaj kvadratoj, sur kiuj legeblas litero. Komence videblis nur la malantaŭa flanko de la kvadratoj. Per turno de ses kvadratoj komenciĝas la ludo. El la surtabligitaj literoj la ludantoj klopodu fari vorton de minimume tri literoj. Kompreneble la vortoj plenumu kelkajn kondiĉojn. La ludanto, kiu formis vorton gajnas la literojn de tiu vorto. Per turno de pliaj kvadratoj kreskas la nombro da surtabligitaj literoj, kaj la ludantoj daŭre povas kunmeti aliajn vortojn.

Luit Staghouwer

26 aprilo 2012

Ineke Emmelkamp revenis antaŭ nelonge de Esperanto-kongreso en Turkio, pri kiu ŝi iom rakontis antaŭ la alveno de Johan, nia prezidanto. La venontan klubvesperon Ineke rakontos pli.

Estis du protokoloj de antaŭaj kunvenoj, faritaj de Nelly kaj Luit.

Wiebren atendos nin sabaton la 26-an de majo je la dek-tria kaj duono en Lemmer por kune viziti la *ing. D.F. Wouda*-drenmaŝinon kaj la novan *Informcentron*. Poste ni iros por kradrosti al *Harich*, kie loĝas Wiebren.

Boudewijn van der Meer el Zwolle, ekskursano de Wil, vizitis ŝin. Post paŭzo de dudek jaroj li iĝis denove aktiva rilate al Esperanto. Harm devos esti operaciita post nelonge je la piedo.

Ineke montris la poŝtmarkojn de ŝi projektitajn okaze de *Esperanto 125*.

En telesendo de asocio *MAX* esperantistoj estis intervjuitaj en *Internacia Esperanto-Instituto* en Hago. Kelkaj el ni spektis ĝin.

Ni aŭdis pri la forpaso de *Catrien Bossong* en Eindhoven. Kelkaj el ni konis ŝin bone.

Post kafotrinkado Luit pritraktis la temon de la vespero, nome *Naturo* aŭ *Malgrandaj bestetoj*. Luit, kiu tre bone povas foti, montris al ni belegajn bildojn de papilioj, libeloj, burdo, raŭpoj, araneoj, skaraboj, vespabelo, diskarabo, hemipteroj, tineo, bufo k.t.p. Ni vidis paruon, filikon kaj kelkajn florojn. Luit rakontis pri la vivkondiĉoj kaj konduto de la bestoj kaj scias la la plimulton de iliaj nomoj. Estis interesa, lerniga prelego!

Wil.

10 majo 2012

Ĉeftemo: Ineke prelegos pri sia partopreno en la Mez-Orienta Esperanto-Kongreso en Turkio.

Wil laŭtlegas la protokolon de la antaŭa kunveno.

La klubo (Esperanto-Centro) havis budon en la urba parko okaze de la Liberiĝ-festivalo. La publiko montris pli da interesiĝo ol pasintjare.

Ineke ĉeestis la funebran adiaŭon de s-ino *Heleen de Geus*.

Wil sendis kelkajn librojn al la 12-jara knabo *Frank*. Li sukcesis en la baza ekzameno de Edukado.net.



La 5-a Mez-Orienta Esperanto-Kongreso okazis en Turkio, en la sud-orienta urbo *Gaziantep*. La urbo estas konata i.a. pro la kultivado de *pistakoj*. Partoprenis la kongreson 28 personoj el kvin kontinentoj. Dum kvar tagoj oni restis en la kongres-urbo, poste oni veturis aŭtobuse al kelkaj aliaj urboj.

Ineke kunportis mapon, du fotoalbumojn, ABC-libron en la kurda (ŝi kolektas tiajn librojn) kaj montris per komputila ekrano fotojn de sia restado en Turkio.

En preskaŭ ĉiuj urboj kaj vilaĝoj troviĝas statuo de *Atatürk*, la fondinto kaj unua prezidento de la respubliko Turkio.

Sur la turkaj bazaroj estas multaj belkoloraj kaj bonodoraj fruktoj, legomoj, spicoj kaj nuksoj.

La partoprenantoj de la kongreso loĝis en studenta hotelo ekster la urbo. En la hotelo oni ne servis tagmanĝon. Por tagmanĝi oni devis iri al la urbo. Bedaŭrinde la kuirejo de la restoracio, kien oni iris la unuan vesperon, estis jam fermita. Oni ja povis ĝui vivantan muzikon, kaj multaj gastoj dancis.

Inter la partoprenantoj estis 16-jara turka knabo, kiu vizitis la urbon Groningen okaze de iu kongreso pri lingvoj. La knabo faris (artefaritan) lingvon.



Gaziantep distancas de la Turka-Siria limo je nur kelkdek kilometroj. Ineke montris i.a. foton de vojmontrilo, kiu indikis, ke Nijmegen distancas je "nur" 3.800 kilometroj. *Gaziantep* estas distanca de *Ulanbatoro* je 8.100 kilometroj. La urboj estas ĝemelaj urboj.

La partoprenantoj faris ankaŭ boatveturadon sur artefarita lago, kaj oni vidis la protektitan *senharan ibison*. Fakte nur la kapoj de tiuj birdoj estas "senharaj". Tiuj birdoj troviĝas nur en Turkio. La pistaklarboj preskaŭ floris. En Turkio oni manĝas i.a. panon, kiu iom similas balonon. Komence la pano estas tre maldika, sed dum la bakado la pano dikiĝas, sed interne estas nur "nenio".



La 6-a Mez-Orienta Esperanto-Kongreso okazos venontjare en Armenio.

Luit Staghouver

La somerrenkontiĝoj

Ni kunvenis en la *Schimmelpenninkhuys*, la *Elanderhus* (*Scandinavisch Dorp*) kaj apud la *Dreesflat*.

Bedaŭrinde ĉeestis nur malmultaj klubanoj.

KELI-kongreso

Reveninte el Zöblitz, kie mi partoprenis KELI-kongreson, mi volonte rakontos ion al vi pri miaj travivaĵoj. Du tagojn antaŭ la komenco de la kongreso mi trajne vojaĝis al Chemnitz por gastloĝi tie du noktojn ĉe partoprenanto de *Pasporta Servo*. Dumvoje mi ricevis en Oldenburgo neatenditan helpon de juna sinjoro, kiu

proponis al mi porti mian kofron. Montriĝis, ke li apartenas al kristana helporganizaĵo. Kiam mi demandis lin kie eblas trinki kafon, li kondukis min al iu ejo, kie estis pli da homoj, kaj senpage regalis min per kafo kun frandaĵo. Mi estis agrable surprizita pri tiu helpo.

En Leipzig mi denove bonŝancis, ĉar la sekva trajno, kiun mi bezonis, atendis ĝis el la malfruinta trajno ĉiuj estis alvenintaj.

Mia gastigantino bovenigis min en *Chemnitz* sur la kajo. Ŝi antaŭe avertis min, ke ŝi loĝas alte, 80 ŝtupojn oni devas grimpi! Malgraŭ tio mi havis agrablajn tagojn ĉe ŝi. Ni multe babilis, kaj ŝi montris al mi interesajn lokojn en la urbo.



Per aŭtobuso mi daŭrigis mian vojaĝon al *Zöblitz*, kie mi kaj tri rumanoj estis transportitaj de iu bushaltejo al la kongresejo. Ĝi troviĝis meze en la *Ercmontaro*. Tio signifis, ke ĉiuj vojoj estis oblikvaj. Krome, la kongresejo situis en malgranda valo, do grimpi estis ĉiam bezonate.

Ĉeestis 53 partoprenantoj, el kiuj mi konis la plimulton. Ili venis el 11 landoj. La etoso estis amika, la programo interesa, la manĝoj bongustaj, la vetero suna, kvankam kelkfoje subite fulmotondris kaj pluvegis, sed ne longe.

Ni ekskursis al subĉiela muzeo kaj al nuksrompilmuzeo, la nura en Eŭropo.



Estis orgenkonzerto en la vilaĝa preĝejo, kaj koncertis por ni montara kantgrupo. Ĉiun tagon la kantemuloj povis partopreni kunkantadon dum unu horo. Estis



mallongaj maten- kaj vesperpreĝoj kaj semajneze diservo en la preĝejo.

La duontagan ekskurson mi neniam forgesos. Ni iris al tre ĉarma rivereto. Sed por atingi ĝin ni devis grimpi malsupren laŭ tre oblikva arbarvojeteto kun multaj ŝtonoj. Sen helpo de granda ombrelo, kiun la edzino de la juna luterana pastoro pruntedonis al mi, kaj kiu tre taŭgis kiel promenbastono, mi ne estus sukcesinta sekvi la aliajn. Nekredeble, ke iliaj du filinetoj resp. du- kaj kvarjaraj kunmarŝis senprobleme!

La prelegoj estis prezentitaj de la kongresanoj mem kaj estis diverstemaj, interalie pri la ĉeĥaj fratoj *Karlo* kaj *Josefo Ĉapek*, Esperanto-verkistoj kaj pentristoj, pri *Dia Regno*, la revuo de KELI nun en Interreto, la Esperanto-biblio, jam parte voĉlegata en Interreto. Cetere pri gramatiko kaj tradukado, la kongreso de IFEF (Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio) en *Herzberg* kaj pri diversaj aliaj temoj. La aŭdiaŭa vespero estis kiel ĉiam tre sprita kaj agrabla.



En 2013 okazos Ekumena Kongreso en *Trento*, Italio, en la dua semajno de aŭgusto.

Riet Heide

17-04-1918 – 25-7-2012



La 25-an de julio 2012 forpasis tute neatendite en sia dormo *Maria Klazina Heide*, 94-jaraĝa, kiun ni konis kiel Riet Heide. La lastajn jarojn de ŝia vivo ŝi estis en maljunulejoj, unue en Groningen, poste en Zwolle. Lastfoje mi vizitis ŝin tie la 13-an de julio ĉi-jare. Tiam kontakton ŝi tre aprezis. Dum multaj jaroj ŝi laboris kiel flegistino en groningena malsanulejo, lastatempe ŝi eĉ ne plu povis piediri. Esperanton ŝi lernis en 1957 per gazetkurso. Ŝi iĝis ano de *KUNE*, de *NEA* kaj estis ĝis sia morto membro de *Esperanto Nederland* kaj de la groningena klubo. Multfoje ŝi vizitis UK-on kune kun sia amikino *Tinie Lanooij*. Ili estis i.a. en Kubo, Brazilo kaj verŝajne ankaŭ en Islando. Tre entuziasme ŝi povis rakonti pri iliaj dumvojaj travivaĵoj. Ankaŭ la Faulhaber-semajnfinoj tre plaĉis al ŝi. De nia Groningena klubo ŝi estis tre fidela membro. Ŝia sanstato jam dum kelkaj jaroj ne plu ebligis al ŝi ĉeesti aranĝojn. Ŝi certe daŭre restos en niaj pensoj.
Wil van Ganswijk-Vlasblom.

Tjaaktje Hiemstra-Brakema

06-01-1929 – 20-7-2012



Pri la forpaso de *Tjaaktje Hiemstra-Brakema* venis sciigo al nia kasisto Luit Staghouver. Ŝi forpasis la 20-an de julio. Ŝi abonis la gazeton de la groningena klubo kaj niaj membroj konas ŝin, ĉar ŝi ofte ĉeestis nian 'Zamenhof-vesperon' meze de decembro. Longe ŝi kaj la pli frue forpasinta edzo estis membroj de FLE. Ili estis entuziasmaj membroj ankaŭ de klubo, kiu okupas sin pri helpo al i.a. trafikviktimoj. Ho ve, la kunvenoj de tiu unuiĝo koincidis ĉiam kun niaj klubkunvenoj. Pro tio niaj kontaktoj restis nur surpraĵaj. Lastdecembre ŝi ŝajnis ankoraŭ tute sana. Tiam Ineke Emmelkamp enmanigis al ŝi 'Jubilean Gratuldokumenton' kaj florojn pro ŝia 50-jara membreco de Esperanto Nederland, pri kio ŝi estis tre surprizita. Nun ni estas akre surprizitaj pro la sciigo pri ŝia forpaso.
Wil van Ganswijk-Vlasblom.

*Bad Zwischenahn, la 1-an de septembro,
renkontiĝo inter esperantistoj germanaj kaj
nederlandaj.
Foto-impreso*



En la parko



La boato kaj panoramo





En la fumajejo



La grupo de 33 samideanoj

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO – taal zonder grenzen